darf. Man erinnere sich, dass bereits mehrfach bedeutende Ansätze nach dem Tod ihrer Schöpfer über kurz oder lang eingegangen sind. Ich nenne nur das Esperanto-Centro in Paderborn oder das Becker-Meisberger-Institut in Blieskastel. Diese Fehler wollen wir nicht wiederholen. In beiden Fällen hing das jeweilige Projekt im Grunde an einer Person. Das muss vermieden werden, denn jeder Mensch ist sterblich und braucht eines Tages einen Nachfolger. Unsere Sache muss aber unabhängig von einzelnen Personen sein. In Blieskastel lag das Problem auch darin, dass eine Immobilie vererbt wurde, die zwar leidlich für ihren Zweck geeignet war, aber es fehlten die Mittel zum Unterhalt – solche wurden nämlich nicht mit vererbt. Eine eigene Immobilie ist von großem Vorteil, weil wir dadurch unabhängig von einzelnen Personen sind und auch unabhängig von der Stadtverwaltung oder anderen öffentlichen Institutionen. Nur müssen wir die bereits gemachten Fehler vermeiden. Ich halte es daher für unbedingt notwendig, dass der DEB e. V., sobald die Mittel dafür vorhanden sind, als materielle Basis eine geeignete Immobilie in Herzberg erwirbt, und bin bereit, mich dafür einzusetzen. Wir brauchen also ein Objekt, das folgendes bietet: Eine zentrale Lage (Sieber oder andere Ortsteile kommen nicht in Betracht); Raum für ein repräsentatives Büro; Raum für eine große, repräsentative Bibliothek; Seminarräume, vielleicht ein Gästezimmer; aber ganz sicher drei bis vier Wohnungen, die vermietet werden, um mit der eingehenden Miete den Unterhalt des ganzen Objekts zu finanzieren. Dieser Aufwand darf nicht unterschätzt werden. Fachleute rechnen damit, dass langfristig die Hälfte der Kaltmiete, die ein Objekt erzielen kann, für Abschreibung und Reparaturen aufgewendet werden muss. Dazu kommen die Betriebskosten. Das Märchen vom reichen Vermieter macht wirklich nur ein Märchen. Viele Amateurvermieter machen nämlich den Fehler, jahrelang nichts zu renovieren und zu modernisieren, weil sie „von der Miete leben“,

und wundern sich, wenn ihre Immobilie nach einiger Zeit baufällig und nichts mehr wert ist. Also brauchen wir, um unser Objekt zu finanzieren, darin drei bis vier Mietwohnungen. Die werden übrigens nicht an Esperantisten vermietet, sondern an solvente Mieter. Es ist völlig egal, ob diese Mieter Esperanto sprechen oder auch nur gut finden: Sie sollen durch ihre Miete den Unterhalt unseres Hauses finanzieren. Ich gebe zu bedenken, dass der Traum von einem „Esperanto-Haus“ ja nun auch schon einmal andernorts gescheitert ist; ein weiteres Beispiel dafür, wie leicht es geschehen kann, dass Idealismus ohne Fachkenntnisse im Desaster enden kann. Ich wiederhole mich: Ohne kaufmännische Fachkenntnisse geht es einfach nicht.

Nun werden manche einwenden, es reiche doch ein virtuelles Büro oder dergleichen, doch das überzeugt nicht: Noch immer wollen die Menschen etwas Reales sehen, Bücher in die Hand nehmen usw. Daher gibt es ja das ICH in Herzberg. Aber das Haus in der Grubenhagenstraße ist auf Dauer zu klein, und es gehört uns nicht. Es ist selbstverständlich, dass jenes Objekt, welches mir vorschwebt, auch modern und zeitgemäß ausgestattet werden muss und nicht etwa mit Möbeln aus dem Gebrauchtmöbelmarkt vollgestopft wird.

Es gibt übrigens die Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg, in der ich der Vorsitzende des Kuratoriums bin, die zum Ziel hat, ein Haus für die Esperanto-Bewegung zu kaufen. Aber diese Stiftung wird, im Gegensatz zu



Esperanto-biblioteko  
en Esperanto-Laden.



Interkultura Centro en Herzberg.

müsste, dass das Geld vorhanden ist, sähe der Ablauf so aus: Die Mitgliederversammlung ermächtigt den Vorstand; danach entscheidet der geschäftsführende Vorstand über einen eventuellen Kauf. Umgekehrt geht es nicht, weil die Prozesse im Verein viel zu lange dauern, der Markt aber schnell ist. Bevor die Mitgliederversammlung diskutiert und entschieden hätte, wäre ein gutes Objekt längst weg. Ich lege aber Wert darauf (und es wäre wahrscheinlich auch juristisch notwendig), dass die Mitgliederversammlung den Plan im Voraus billigt, wenn es so weit ist.

Wir haben nun genug Zeit, um uns in Ruhe über meinen Vorschlag Gedanken zu machen. Ich beobachte den Markt in Herzberg seit langem und bin sicher, dass sich ein geeignetes Objekt finden könnte. Ich bin auch überzeugt, dass wir auf diese Weise Leute anziehen können, die zur Mitarbeit dort bereit sind und unsere Sache einen Aufschwung nehmen würde. Sollten aber Ängstlichkeit und Kleingeisterei obsiegen, sehe ich langfristig schwarz für uns. Dann wird sich alles, was wir in Herzberg erreicht haben, über kurz oder lang in Luft auflösen und in die Liste unserer gescheiterten Ansätze einreihen: Paderborn, Blieskastel, Einbecker Straße. Das will ich nicht ein weiteres Mal erleben.

Ich rufe also zur Diskussion auf. Schicken Sie Ihre Ideen, Anmerkungen usw. an die Redaktion. Natürlich sind auch Spenden, Vermächtnisse etc. willkommen.

Andreas Emmerich

uns, auf lange Sicht nicht die Mittel haben, ihr Ziel zu erreichen; außerdem haben wir im Grunde wenig Einfluss darauf, denn der Vorsitzende ist laut Satzung stets der Bürgermeister. Und was ist, wenn eines Tages ein Bürgermeister von Herzberg nichts mehr von Esperanto hält?

Einen weiteren Einwand nehme ich ernster: Es muss eine Person geben, die sich um das Objekt kümmert. Aber: Solange ich da bin, bin ich bereit, diese Aufgabe zu übernehmen, auch falls ich eines Tages aus dem Vorstand ausscheiden sollte. Es dürfte allgemein bekannt sein, dass ich mich halbprofessionell mit Immobilienverwaltung beschäftige und unter anderem auch ein Objekt in Herzberg besitze, das ich aus der Ferne verwalte. Im Übrigen kann man diese Aufgabe auch sehr leicht einem Dienstleister übertragen.

Ich plädiere auch dafür, dass wirklich der Verein sich engagiert, und nicht eine Privatperson, aus den bereits genannten Gründen. Und die Möglichkeit, dass eine Person eine Immobilie kauft und dann dem Verein vermietet oder verkauft, kommt nicht in Frage, denn das würde selbst bei größter Transparenz augenblicklich den Verdacht der Vorteilsnahme nach sich ziehen, was unbedingt vermieden werden muss. Tatsächlich habe ich über eine solche Konstruktion nachgedacht, doch schließe ich sie, eben aus diesem Grund, kategorisch aus. Sollte der Vorstand den Plan fassen, meinen Vorschlag eines Tages ins Werk zu setzen, wobei natürlich die Voraussetzung erfüllt sein



Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, bretardetalo.



Vagono Esperanto en Esperanto-urbo Herzberg.



Viktoria-parko kaj Esperanto-Laden, Officejo de Germana Esperanto-Asocio.

# Kalendaro

## Februaro – Aŭtuno 2024

### 10. Februaro ĝis aŭtuno 2024 en Herzberg, Germanio

Ekspozicio: Otto Dix en la Unua Mondmilito “Mi tre forte esperas, ke baldaŭ estos paco.” En kunlaboro kun la Otto-Dix Muzeo de la urbo Gera.

## Septembro 2024

### 20. - 22. Septembro 2024 en Hasselt, Belgio. Beneluksa

Kongreso 2024. Informoj: <https://olijslagers.info/LEA/>

## Oktobero 2024

### 18. - 20. Oktobero 2024 en Hamm, Germanio

REVELO-Sprachkurs im Schloss Oberwerries, Hamm  
Rückfragen an Andreas [andreas.diemel@esperanto.de](mailto:andreas.diemel@esperanto.de) (link sends e-mail) oder 0800 336363 5114 (innerhalb von Deutschland kostenlos). Anmeldung: [www.esperanto.de/revelo](http://www.esperanto.de/revelo)

### 20. - 25. Oktobero 2024 en Arnsberg, Germanio. 12-a

Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA 2024). Informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/sperti/esperanto-aran%C4%9Doj-en-germanio>

### 26. Oktobero 2024, 18h en Aalen: Alena Esperanto-

Kulturpremio por Kĵara – aliĝu per [fame2024@esperanto-aalen.de](mailto:fame2024@esperanto-aalen.de).

## Novembro 2024

### 07. - 10. Novembro 2024 en Žilina, Slovakio

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST)

Informoj ĉe: <https://kaest.ikso.net/2024/>

### 08. - 10. Novembro 2024 en Homburg, Germanio

73-a Kultura Semajnfino de la Sarlanda Esperanto-Ligo

Informoj ĉe: <https://esperanto-saarland.info/veranstaltungskalender/>

### 14. - 17. Novembro en Pisa, Italio

ZAT 2024 / Internacia Seminario de Itala Esperanto-Instituto. Informoj ĉe: [info@30oredoro.it](mailto:info@30oredoro.it)

## Decembro 2024 – Januaro 2025

27. Decembro 2024 – 02. Januaro 2025 en Bernardfagne, Belgio. Junulara Esperanto-Semajno (JES).

Informoj ĉe: <https://verdajskoltoj.net/es/jes-24-25/>

### 28. Decembro 2024 – 03. Januaro 2025 en Bielefeld,

Germanio. La silvestra renkontiĝo de la GEA.

Informoj ĉe: [www.esperanto.de/de/luminesk](http://www.esperanto.de/de/luminesk).

## Krucenigmo >

La solvon bv. sendi al: [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos donace la verkon “107 krucenigmoj en Esperanto” de la aŭtoro Stano Marček.



	LA UNUA KAŜITA PROVERBO	SIMBOLO DE AMPERO	PLENA VORTARO		FARAS ION IA	MAL-JUNUL' AĜUL'	LA DUA KAŜITA PROVERBO
SUPRA KORPO-PART'					MAL-MULTE FEMAL'		
ADVERBA FINAĴO		FREŜA, RAPIDEGA NEGIS					
AVIADILA SIMBOLO DE NORVEGIO			METALA MONTRIL' PURA, DE-FINITIVA				
REZINORICA LIGN'					PREPOZICIO NATURA BASENO		
TIAMANIERE						NOMO DE LA 16-A LITERO MARGUSTA	
EKZISTAS							AKUZATIVA FINAĴO TREMI PRO DANGERO
ROMANE 1000		VIRINA NOMO MEZURUNU' (brulligno)					
POST-SKRIBO			OLEORICA ENUKT' KORTA BIRD'				
SUFIKSO DE PASIVA PREZENCIA PARTICIPO					KORINKLINI KOVRAS PER ORO		
LIGILO EL KUNIGITAJ RINGOJ						SIMB. DE IRIDIO MALJUNAS	
MALKOREKTA							INFINITIVA FINAĴO SUISTA KUDRILEG'
SIMBOLO DE SULFURO		MALSTULTAN SKOTA VIRAJUP'					
NUMERALO			NATRIA KLORIDO POSEDATA DE TIU				
METALA KUNIGIL'					KONJUNKCIO VICMONTRA NUMERALO		
ELEKTITAR'						VIRAJMI MONTO KUN PASTEJOJ	
ĈIELE MALPEZA							ADJEKTIVA FINAĴO LA GASOJ ĈIRKAŬNI
SIMBOLO DE SIMENSO		GRUP' DA LITEROJ FARITA DE HOMO					
SIMBOLO DE TANTALO			VICIG' POR KONTROLO AMUZKUNVENO				
GRANDA LIGNECA PLANT'					VALORA METALO VULKANA ELFLUAJO		
LOĜEJ' POR BRUTOJ						SUFIKSO (FRAKCIO) SENKAVA MALHUMIDA	
RAPIDE MOVIGAS MAL-SUPREN							AUTOSIMB. DE SVEDIO KUBANA DANC'
SUBSTANTIVA FINAĴO		DEDICU, DONACU AFABLA DEZIRAD'					
PRENU (SUR RECEPTO)			INTERES' PROFESI' VIRA VESTO				
GERMANA E-JUNULARO					KUN KORINKLINO JUNULARA SEKCIO		
TUTE MALGRANDAJ						ONOMATOPEO (tremo) SUFIKSO (TUMORO)	
GERMANO APUD ELBO							LA SESATONO ROMANE UNU
LIRIKA POEMO					PREFIKSO (malĝusta faro)		

## Karaj legantoj de GEJ-Gazeto,

**Ĉ**u vi jam spektis la serion Esperanto Senlime? Ĝi estas esperantlingva realecserio televida, malgrandbuĝeta, realigita per eŭropa subvencio mono, nun spektebla en Jutubo. Se vi ankoraŭ ne aŭdis pri ĝi, bonvolu ĝisdatiĝi. Por fari tion, vi povas ekzemple tuj legi la artikolon de Stefan Grotz, kiu sekvas. En ĝi, Stefan klarigas al vi la bazan koncepton de la serio. Interesa fakto estas, ke unu el la redakcioj de GEJ-Gazeto, Michael Vrazitulis, mem partoprenis en tiu realecserio! Mi (Michael) kundividis ĉi tie miajn impresojn pri tiu sperto, kiu ĉefe temis pri multe vojaĝi kaj fari stultaĵojn, en formo de mia tiama taglibro, kies unuan parton vi povas legi en ĉi tiu eldono. Oni ne forgesu tamen, ke dum vojaĝado oni ankaŭ povas vole-nevole krei

multe de rubaĵoj. Teme pri rubaĵoj en urbaj stratoj, alia redakciano, Paula Weil, priskribas en sia artikolo ĉi tie, kiel ŝi kreas arton per LEGO-figuroj kaj stratrubo, por tiel atentigi pri mondaj problemoj de daŭripoveco. Plue en la gazeto, la franca volontulino Gabrielle Guillemot raportas pri ĵus okazinta festo ĉe la Esperanto-Stacio Halbe, kiu kunigis kaj esperantistojn kaj lokanojn.

Se vi estas junulo kaj mem ne volas maltrafi pli da festoj kaj amuzaj renkontiĝoj, bonvolu legi la etan resumon preparitan, kiu sekvas poste, pri junularaj eventoj en Germanio (kaj Belgio), kiuj okazos dum la venonta periodo de aŭtuno kaj vintro. Kiel ĉiam, agrablan legadon!

**Michael Vrazitulis kaj Paula Weil,**  
por redakcio de GEJ-Gazeto.



Grupfoto de partoprenantoj de 1-a sezono de Esperanto Senlime, Julio/Aŭgusto 2023

## Esperanto Senlime – nova vojaĝa serio furoras en Jutubo

*„Ĉu vi iam vidis reklamon de freneza televidprogramo kaj pensis: ho ve, mi ŝatus, ke ni havu tion en Esperantujo? Bone. Jen via revo realigita: En la nova reta videoserio „Esperanto Senlime“ 17 junuloj konkuras dum 10 tagoj vojaĝante tra 4 landoj de Eŭropo, plenigante la plej frenezajn, stultajn kaj amuzajn defiojn.“*

En la somero 2023 grupo de Esperantistoj vojaĝis el Roterdamo al Barcelono. Ili kunportis kameraojn, Interrail-biletojn kaj kaktan kiu nomiĝas Benedikto. La celo: krei la unuan realec-televidan serion en Esperanto, similan al la usona serio „The amazing race“. La serio Esperanto

Senlime nun estas spektebla en la jutuba kanalo de TEJO. En ĝi oni malkovras la aventurojn de junuloj, kiuj konkuras alfrontante defiojn por gajni poentojn, dum 3 organizantoj zorgas, ke neniu perdiĝas.

Sed la 16 epizodoj de la serio ne estas kopio de fama serio. Anstataŭe, la muntisto Benĝi, kiu ankaŭ registris la fonan voĉon de la serio, sukcesis krei tute propran stilon kaj humuron. La lingvo de la partoprenantoj ne ĉiam perfektas, kaj kelkaj partoprenantoj estas komencantoj. Tamen por mi, la serio bone montras la aŭtentikan etoson de reala Esperantujo, precipe ĉar ili ĉiuj ricevis la subtenon de pluraj lokaj esperantistoj dum la vojaĝo kaj vizitis lokojn kiel la Centra Oficejo de UEA/TEJO en Roterdamo. Samtempe kelkaj interagoj dum la serio estas en aliaj lingvoj, kiam ili petveturas aŭ interagas kun fremduloj dum defioj. Ne temas pri serio por puristoj. Ĝi simple estas amuza serio, kiu ridigos vin ofte, kaj kelkfoje ĝi eble eĉ plorigos vin.

La projekto nur estis realizebla dank' al mona subteno de la Eŭropa Unio. Kaj estas bona novaĵo: TEJO jam ricevis monon por dua sezono. Ĉi-somere la partoprenantoj de la dua sezono vojaĝos el Berlino al Vilno en Litovio kaj espereble filmos eĉ pli bonkvalitan duan sezonon kun ĉiuj spertoj de la unua serio.

**Stefan Grotz**

## Festivalo ĉe la Esperanto-Stacio

La unuan dimanĉon de Junio ĉi-jare okazis tre speciala aranĝo ĉe la Esperanto-Stacio en Halbe: familia festivalo kun kulturo kaj amuzo, la Trajnstacia Festivalo „Zug um Zug“!

Tiucele, per evento senpage enirebla por ĉiuj, la stacidomo malfermis sian pordon por bonvenigi ĉiujn urbanojn, kun evento invitanta infanojn kaj familiojn amuziĝi, lerni pli pri la riĉa historio de la stacidomo, malkovri la fascinantan mondon de Esperanto, krom provi la stel-alloĝaĵon de la stacio, nome avangardajn ilojn por Virtuala Realeco (VR)!

Multaj alloĝaĵoj, manĝbudoj kaj standoj homekipitaj fare de la lokuloj akompanis varian programon, plenigitan per spektakloj, ekspozicioj, muziko kaj korusoj, same kiel la maloftan malfermon de la Kaiserbahnhof kiel provizora kafejo kaj koncerto.

Kulminaĵoj de la tago:

### Infana koruso de la Muziklernejo Wildau

La infanoj de la koruso de la muziklernejo Wildau, en aĝo de 8 ĝis 13 jaroj, kantis belajn kantojn, kaj modernajn kaj tradiciajn, gvidate de sia instruisto post esti instruitaj dum la tuta lerneja jaro. La lernejo funkcias kiel ŝtata agnoskita neprofitcela institucio ekde 1996.

### Virtualrealeca ĉambro „Kavo“

Okazis programero direktita de „VR-Mondo“, grupo, kiu ofertas facilan aliron al avangardaj iloj por sperti Virtualan Realecon, donante la ŝancon al ĉiuj praktiki ciferecajn kapablojn, inspiri kreivon kaj stiri novigon. Kombinante sian kompetentecon pri kulturo, edukado, lingvotrejnado kaj VR, ili celas esti ĉe la avangardo de ĉi tiu kampo.

### Voĉa Ensemblo de la Muziklernejo Wildau

Ĉi-foje, anstataŭ la infanoj, estis plenkreskuloj, kiuj eniras la scenon! Amatoroj, novuloj al la kantsceno aŭ plentaŭgaj kantistoj, la koruso kunmetita de dudek du membroj ravis nin per multaj bonegaj klasikaĵoj...

### Inaŭguro de la ekspozicio „ZUG UM ZUG“

Nun instalita en la spaco antaŭ longe okupita de la restoracio de la fervoja stacidomo estas bonega kaj ĝisfunda fotografia ekspozicio, prezentanta la historion de la fervoja stacidomo, de ĝia konstruo en 1865 kune kun ĝia fratina

stacio la Kaiserbahnhof, ĝis ĝia transformo laŭlonge de la jaroj ĝis fine iĝi private administrata domo servanta la ideojn de Esperanto kaj homaj rajtoj.

Entute, tio estis belega evento, kie la loĝantoj de Halbe, la laboristo de la stacidomo kaj ĉiuj volontuloj kunvenis por krei bonegan sperton por ĉiuj, helpate de la unuaj varmaj someraj tagoj, por alporti al la publiko memorindan sperton.

**Gabrielle Guillemot**

## DEJ-Treffen im Herbst und Winter

### Liebe DEJ-Mitglieder und sonstige Junuloj,

ab Herbst 2024 geht es wieder weiter mit unseren kleinen und größeren Esperanto-Treffen:

Am 27.–29.9. wird aller Voraussicht nach (zu Redaktionsschluss sind einige Details noch ungeklärt) ein neuartiges Treffenformat in Bonn stattfinden, das GEJMS! Diese Abkürzung steht für Granda Esperantista Junulara Matĉo Semajnfina. Wie der Name schon vermuten lässt, geht es beim GEJMS, anders als etwa beim KEKSO oder dem DEJ-Wochenende, weniger ums Lernen oder um Vereinsarbeit, sondern wirklich nur um Spiel und Spaß! Wir erwarten neben deutschen auch einige internationale junge Teilnehmende, und wir wollen gemeinsam ein buntes Wochenende mit Stadtralleys, Spielen und generell verschiedenen kleinen und unterhaltsamen Wettbewerben verbringen. Mehr Infos und das Anmeldeformular findet ihr natürlich auf [esperantojugend.de](http://esperantojugend.de).

Danach geht es am 29.11.–1.12. in Nürnberg weiter mit dem KEKSO (Kreema Esperanto-KurSO). Dies ist unser



KEKSO 33a Kreema Esperanto-Kurso Nürnberg 29.11.–1.12.2024

Infos & Anmeldung: [mallonge.net/KEKSO33](http://mallonge.net/KEKSO33)

Anfängerfreundliches Jugendtreffen mit Esperanto-Sprachkurs

**Am ersten Adventswochenende findet das KEKSO in Nürnberg statt**



## Das Silvestertreffen JES erwartet euch diesmal in Belgien!

übliches, anfängerfreundliches Treffen, auf dem immer auch ein Einstiegssprachkurs angeboten wird. Diesmal findet das Herbst-KEKSO recht spät statt, fällt dadurch tatsächlich sogar auf das erste Adventswochenende. Also wird auch Weihnachtsmarkt-Stimmung angesagt sein! Wenn ihr das nicht verpassen wollt, dann meldet euch am besten direkt an über unsere Webseite [esperantojugend.de](http://esperantojugend.de).

Schließlich findet als Jahreshöhepunkt und -abschluss das JES (Junulara E-Semajno) vom 27.12.24 bis zum 2.1.25 statt. Diesmal nicht in Deutschland oder Polen, sondern ... in Belgien! Das hat den Grund, dass dieses wunderbare einwöchige Großevent dieses Jahr nicht von uns von der DEJ, sondern dankenswerterweise von den Verdaj Skoltoj, einer Esperanto-Pfadfindergruppe, veranstaltet wird. Nichtsdestotrotz findet im Rahmen des JES in Belgien aller Voraussicht nach auch wieder die Mitgliederversammlung der DEJ statt, und zwar am 30.12. Wenn ihr eine bunte und wilde Woche um den Jahreswechsel herum mit vielen jungen Esperantistoj aus allen möglichen Ländern erleben wollt, dann meldet euch einfach sofort an unter [verdajskoltoj.net/jes-24-25](http://verdajskoltoj.net/jes-24-25).

Wir sehen uns bald auf den Treffen!

**Michael Vrazitulis**, für den DEJ-Vorstand

## Taglibro de vojaĝkonkursinto

Unu el la partoprenintoj de la vojaĝkonkurso kaj televidserio „Esperanto Senlime“, kiun Stefan priskribas en sia jusa artikolo, fakte estis mi, Michael! Kune kun 16 pliaj Esperantaj junuloj, mi devis vojaĝi dum dek tagoj tra Eŭropo kaj plenumi diversajn defiojn, dum kiuj ni filmis nin. Ni estis dividitaj je 8 diversaj teamoj, kaj per

la plenumitaj defioj kolektadis poentojn kaj tiel konkuris unuj kontraŭ la aliaj. Mia teamo estis la sola triopo (la ceteraj ĉiuj estis duopoj), kaj ni nomiĝis „La Bierknaboj“.

Ĉio ĉi okazis dum somero de la pasinta jaro 2023, kelkajn tagojn antaŭ la komenco de la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Lignano Sabbiadoro, Italio, kiun pluraj el ni vojaĝkonkursintoj tuj poste ĉeestis. La vojaĝkonkurso estis vere amuza kaj unika sperto. Nun, ke regule aperas ĝiaj filmetoj (kvazaŭ televidseriaj epizodoj) en la YouTube-kanalo de TEJO, estas tre bele por mi esti memorigata pri tiu ĉi aventuro, spektante la filmetojn kaj dume ridante multe. Nepre mem spektu la epizodojn de Esperanto Senlime, ili vere estas tre distraj, ankaŭ danke al la mirinda laboro de nia elstara videomuntisto Benĝi!

Por doni al vi iom pli personan raporton pri la sperto kaj la diversaj etapoj de la vojaĝo, kiu komenciĝis en Roterdamo kaj finiĝis en Barcelono, mi pripensis kundividi ĉi tie la enhavon de mia taglibro el tiu tempoperiodo. (Ĉar jes, tre oportune, mi regule skribas taglibron en Esperanto.) Kvankam mi foje tendencas skribi en la taglibro iom seke kaj stenografie (mi pensas), mi esperas, ke interesos vin tamen legi tiun ĉi personan raporton pri la vojaĝkonkurso de Esperanto Senlime. La raporto komenciĝas unu tagon antaŭ la komenco de la aventuro, la 23-an de Julio 2023, ĵus kiam mi forlasas la domon de mia familio, kie mi estis vizitanta, por sekve veturi al ĉefstacidomo de Berlino kaj de tie preni noktan trajnon al Roterdamo ...

### Dimanĉo, 23-a de Julio 2023

Vespere, mi ekiras, ŝlosas la malplenan familian domon kaj direktiĝas al ĉefstacidomo. Noktan trajnon al Roterdamo mi prenas de tie. Ege hazarde, mi renkontas la polojn Adam, Rafaŭ kaj Adrian en la sama sesopa trajncambreto, kie mi rezervis lokon. Ni iom babilas kaj poste dormas. Alkoholema kaj ronkema brito mezaĝa kaj dikega iom maloptimumigas la sperton kaj eblon ripozi.

### Lundo, 24-a de Julio 2023

Do mi alvenas en Roterdamo kune kun la poloj. Ni marŝas al Centra Oficejo (CO). Survoje mi prenas matenmanĝon. En CO, jam ĉiuj aliaj partoprenantoj kaj organizantoj ĉeestas. La ludo estas klarigata. Mi salutas multajn homojn. Sekve, mi iras duŝi min en Volontula Domo (VolDom). Tie ni poste tagmanĝas. Posttagmeze, la tuta afero vere komenciĝas. Okazas urboludo, kie la diversaj teamoj (interalie mia kun Lino kaj David kataluna: La Bierknaboj) devas plenumi multajn defiojn por kolekti poentojn. Dume ni bezonas



filmi nin. Estas amuze, sed ankaŭ lacige. La detalojn eblos iam spekti en Jutubo. Ni kaj aliaj partoprenantoj poste iom umas surterase en VolDom kaj vespermanĝas. Pli tarde vespere, mi iras viziti CO-n denove kun David kaj Lino, kie ni tri poste tranoktos. La domo estas ege arkiveca. Ni iras bierumi ie trioje, kie ni klarigas la studentasocian tradicion de la drinkludo „bierknabo“ al David.

### **Mardo, 25-a de Julio 2023**

Estas vojaĝa tago de Esperanto Senlime. Lino, David kaj mi trajnas de Roterdamo al Sarlando tra Bruselo kaj Luksemburgo. Dume ni plenumas kelkajn el la defioj kaj filmas nin. Pluvetas iom. Ni kuniĝas kun aliaj teamoj en Trier kaj, fine en Merzig, prenas buson por atingi nian hazardan tranoktolokon Weiskirchen. Iam evidentiĝas, ke Jordi kaj Jaime akcidente vojaĝis al malĝusta Weiskirchen/Weißkirchen, apud Frankfurt, kaj ke Katoo kaj Adam sciis pri tio, sed trole ne avertis ilin. Vespere, ni Bierknabo kaj la tri partoprenantaj poloj iras al restoracio por trinki bieron kaj parte ankaŭ vespermanĝi. Ree en la junulgastejo, post plia biero kaj duonfinludita kartludo, je meznokto ni ĉiuj festas surprize la naskiĝtagon de Yentl-Rose kaj Sofia.

### **Merkredo, 26-a de Julio 2023**

La tutan tagon ni estas en kaj apud Weiskirchen. Okazas ia ennaturo defiaro. Ni marŝas tra bestoparko, arbaro, plenumas taskojn, kaj intertempe ni plurfoje bierumas en gastejo. Miaj piedoj iom doloras en evidentiĝe iomete tro malgrandaj ŝuoj. Iam ni alvenas al tiel nomata Kneipp-ejo, kie oni povas bani piedojn kaj kruojn. La akvo ege fridas. Stulta defieto estas, ke ni devas kanti „Dek Bovinoj“ tie. Do tiel ni faras, suferetante. Ni remarŝas al la ejo en Weiskirchen sufiĉe longe. Ni vespermanĝas kune kun la aliaj. Pli malfrue, kiel eta grupo de ni Bierknaboj kaj ankaŭ Jordi, Jaime, poste ankaŭ Adam, Katoo, ni iras drinki en ŝiŝaejo hazarda (kaj ankaŭ ŝiŝaumi). Pasiginte kelkan tempon tie, ankaŭ kartludante iom, ni fine repromenas ejen. En la enireja halo, malmultaj el ni ankoraŭ umas dum iom da tempo. Okazas disputo inter Lino, unuflanke, kaj organizantoj Carlos kaj Auŝriné, aliflanke, pri la ioma hibriso de la organizantoj okazigi petveturadon (por la vojo de Dijon al Lyon) sen mem esti iam ajn petveturintaj.

### **Ĵaŭdo, 27-a de Julio 2023**

Denove estas vojaĝa tago. Hodiaŭ ni trajnas ĝis Dijon. Intertempe dum la vojaĝo, ni Bierknaboj hazarde estas alparolataj de maljuna esperantistino, kiu sidas en sama trajno kiel ni kaj subaŭskultis nian Esperantan paroladon. Ŝi ĉeestis same la Germanan Esperanto-Kongreson en Braunschweig ĉi-jare, ŝi rakontas. Post gaja babilado, ni baldaŭ adiaŭas ŝin, ĉar ni devas eliri, kiam la trajno haltas en Saarbrücken. Ni restas tie iom da tempo, antaŭ la sekva ŝanĝo. Mi ege ĝojas havi iom da tempo tie por aĉeti aliajn ŝuojn en la aĉetocentro „Europagalerie“, ĉar tiuj aĉetitaj pasintsabate iom tro malgrandas evidentiĝe, kio iom dolorigis piedojn konstante dum lastaj tagoj.

David, Lino kaj mi iras manĝi „Dibbelabbes“, sarlandan tradiciaĵon, en la restoracio „Die Kartoffel“. Lino tie ankaŭ skribas retpoŝton al Patricio, iom memee. Ni veturas al Forbach. De tie plue ni trajnas al Metz, Nancy, kaj fine ni sidas en trajno direktita al Dijon. Ankaŭ aliaj teamoj de la konkurso estas tie kun ni. Ni iom babilas kaj filmiĝas. Iom antaŭ Dijon, ni denove ŝanĝas trajnon por mallonga tempo, laŭ rekomendo de Severija. Ĉar fakte estas tiel, ke nia hotelo estas iom en la pugo de la mondo, ĉe la urborando de Dijon, do indas ne veturi ĝis la centro. En la lasta trajno, ni dancas kune la Bambon. Poste ni marŝas sub suna fruvespera ĉielo tri kilometrojn ĝis la menciita hotelo. La organizantoj, do Carlos, Auŝriné kaj Legolas, kune kun kelkaj partoprenantoj, jam atendas nin tie. La hotelo vere estas iom hazarda, ĉefe estas tie krom ni nur kamionŝoforistoj kiel gastoj. En la necesejoj malhaveblas sapo. Mi havas ĉambron kun David. Post iom da ripozo, ni vespermanĝas ekstere apud enirejo kun aliaj, poste ni tri prenas bierojn en apuda hotelo. Iam ni iras enlitiĝi. Morgaŭ ni devos petveturi al Lyon. Ni iom zorgas, kiom sukcesaj ni kiel tri iĉoj kune povos esti pri tio ...

### **Vendredo, 28-a de Julio 2023**

Estas la tago de petveturado. Mirakle, ni trioje kaj iĉe sukcesas facile. Jam post nur tri minutoj da atendado pli-malpli, iu ĉarma geparo samaĝa kiel ni, vojaĝanta pro translokiĝo per du veturiloj (kamioneto kaj aŭto), kunprenas nin ĝis antaŭurbo de Lyon. Jordi kaj Jaime havas ege malpli da bonŝanco, kaj eĉ nur duope kaj starante je sama loko kiel ni iom poste devas atendi 4–5 horojn ĝis sukceso. Ni venas al la renkontiĝloko, iam fruposttagmeze, do al la placo apud la Muzeo Confluences. Organizantoj kaj du aliaj teamoj jam estas tie, alvenintaj, kaj bonvenigas nin. Ni estas tie dum iom da tempo kaj faras kelkajn stultajn defietojn, interalie krei homturon (kataluna tradicio), bani hararon en fontana akvo kaj anonci solene la finan venkon. Pli poste, ni iras al nia hotelo, kiu estas la ĝis nun plej luksa tranoktejo de la konkurso. Ĝi eĉ havas naĝejon! Estas tie ankaŭ la lokano Alekĉjo, kiu preparis la morgaŭan urboludon kaj loĝos same en la ĉambro de ni Bierknaboj kaj Legolas ĉi-nokte. Lasinte niajn aĵojn hotele, ni en mezgranda grupeto iras superbazaren por aĉeti manĝaĵojn kaj bierojn. Ni komencas iom amuziĝi en la hotelo, bierumante, organizante „Orangina-bubaĉon“ (kvazaŭ bierknabo-drinkludon, sed kun Orangina anstataŭ biero) inter du aliaj teamoj kaj ankaŭ saltante bombojn en la naĝejo hotela. Okazas iu hazarda diskuttrondo pri daŭripovo tuj antaŭ komuna vespermanĝo. Post manĝo, ni pludrinkas kaj iam denove iras naĝejen. Amuz-sovaĝaj homturaj bataloj okazas enakve. Poste mia malantaŭa kolo iom doloras. Pli tarde, mi bierumas kun Alekĉjo, David, Yentl-Rose kaj Sofia en parko apud preĝejo. Lino iam alvokas, ĉar li bezonas la ĉambrokarton. Mi portas ĝin al li rapide kaj poste revenas al la bieruma loko ekstera. Ni restas tie dum eble preskaŭ horeto, poste revenas hotelen. (Daurigota.)

**Michael Vrazitulis**

## Esplorado de stratrubo per LEGO-figuroj

Ekde 2021 mi fotas en ĉiu Julio LEGO-figurojn aranĝigitajn en stratrubo. Kelkfoje la LEGO-figuroj ludas kun la rubo laŭ la origine pripensita funkcio de la aĵoj, kelkfoje estas novkreitaj situacioj. Post foti mi forjetas la stratrubon en rubujojn, kompreneble. Mia ideo kun ĝi: montri rubon en alia, iom ludema kaj artema kunteksto kaj dume akcentigi la problemon de tro da rubo en la medio kaj nia ekonomia sistemo.

Inspiro por la agado estis la kampanjo „senplasta Julio“. Tiu agadmonato, fondita de la senprofita organizo plasticfreejuly, ekzistas ekde kelkaj jaroj. La organizado venas origine el Aŭstralio, sed ankaŭ faras internacian laboron. La kampanjo provas atingi je pli da publika videbleco por nia grandega problemo de tro da (plasta) rubaĵo. En la centro staras ideoj por redukti unuvojn plastan rubaĵon en la ĉiutaga vivo de privataj personoj per neenpakitaj aĵoj, plurfojuzeblaj aĵoj ktp. Por atingi tion, la kampanjo ankaŭ provas krei la sociajn, politikajn kaj ekonomiajn antaŭkondiĉojn.

Nun vi povas pensi, ho, kolekti, foti kaj redukti iom la rubon estas bela kaj bona. Ĝuste. SED: Rubo havas sistemon.

Nia aktuala ekonomio vivas de forjetado. Se ni volas reduktadon de rubo, ni devas trakti tiun problemon sisteme, en la radikoj. Ni bezonas regulojn, kiuj reduktas pakajojn, ebligas kaj truddevigas recikligadon, reduktas la jam ekzistantan rubon en la medio, plimultkostigas forjetadon, kreas ekonomiajn cirklojn.

Kial estas pli malmultekoste por entreprenoj detruiri novvarojn ol ankoraŭ vendi ilin? Kial kostas karotoj en plasta sako pli malmulte ol karotoj sen plasta sako? Kial tiom multe da materialoj ne estas recikligeblaj? Kial ŝajne tute ne gravas por ni, kiel multe da rubo estas ĉie en nia mondo?

Privataj decidoj en tiu sistemo ne eblas por ĉiu, pro mentalaj kaj/aŭ financaj kapabloj. Kelkaj homoj nepre bezonas unuvojn produktojn. Tial, ĉi tio tute ne temas pri kondamni homojn, kiuj, pro iuj ajn kaŭzoj, uzas unuvojn produktojn. Temas pri ni kiel socio, kiu devus reflekti la amasegon da rubo, kiun ni ĉiutage akceptas. Por tio, ni ĉefe bezonas pensŝanĝon en la politiko kaj la ekonomio. Simple daŭrigi nian forjetsocion ne estas diskutibla pro la fakto, ke ni vivas sur finonta planedo. Resursoj por tiamaniera konsumo ne povas ekzisti daŭripove. Kaj ni ne devus forgesi estimi ĉiun estulon, kun kiu ni dividas nian mondon. Jam estas pli da plasto ol fiŝoj en la maroj kaj plastroj eĉ estas troveblaj ĉe la forforforejoj de la mondo.

Tial ni dediĉigu sisteme al rubo. Ĉi tie, kun iom da arto kaj filozofiado pri la problemo.

**Paula Weil**

Arto kun rubaĵoj kaj LEGO-figuroj.



# Beneluxa Kongreso de la 20-a ĝis la 22-a de Septembro en Hasselt (Flandrio)

La Beneluxa Kongreso okazos de la 20-a ĝis la 22-a de Septembro 2024 en Hasselt, Belgio.

**E**n la provinco Limburgo, apud la germana landlima urbo Aachen, okazas la beneluxa kongreso en la junulargastejo tuj apud la fervoja stacidomo. La urbo, kie iam estis distilita la fama *Jenever* (juniperbrando aŭ nederlanda ĝino), invitas vin al semajnfino plena de Esperanto-spertoj: eblas ekskurso al la japana ĝardeno aŭ al la Hasselt Modehuis, same kiel la sporto de la belga junularo, Boulderen. Jonny M. proponos koncerton kaj kantatieron. Okazos lingvokurso, krome estos FEL-libroservo kun ampleksa oferto. Loĝado kun plena pensio kostas 240 eŭrojn. Pliaj informoj haveblas ĉe <https://beneluxo.eu/beneluxa-kongreso-2024-en-hasselt/>



# 73-a Kultura Semajnfino de la Sarlanda Esperanto-Ligo

Se vi pasintjare partoprenis la Kulturalan Semajnfino (KSF) okaze de la 100-jara jubileo de Sarlanda Esperanto-Ligo, vi

espereble havas bonajn memorojn pri tiu bonetosa aranĝo. Se vi bedaŭrinde maltrafis la belegan eventon, venas nun nova okazo partopreni.

**S**arlanda Esperanto-Ligo jam estas preparanta la sekvan eldonon de la ŝatata KSF kaj esperas pri multnombra partopreno el ĉiuj najbaraj regionoj. La venonta 73a Kultura Semajnfino okazos de la 8a ĝis la 10a de Novembro 2024 denove en la Kardinal-Wendel-Domo en Homburgo, ĉar tiu estas sendube la plej agrabla gastejo en la tuta Sarlando (<https://www.kardinal-wendel-haus.de/>). Atendas vin interesa programo konsistanta el diversaj prelegoj por Esperanto-parolantoj, Esperanto-kursoj por progresintoj kaj komencantoj. En la libroservo de Jean-Luc Thibias vi certe trovos allogan legaĵon kaj esperantaĵojn.

Ni komencos la semajnfino jam vendrede posttagmeze per via alvojaĝo kaj post la vespermanĝo ni aŭskultos dum bonveniga vespero jam la unuan prelegon kiu gvidos (ĉifoje vere!) al posta amuza kvizo. Vi eĉ povas gajni premion (promesite!). Poste ni kunsidos en etosa rondo en la knajpo (sarlande: vertŝaft') kaj Ralph Glomp kantos por ni.

La sabaton kaj la dimanĉon ni dediĉos al prelegoj, lingvokursoj kaj ekskurso en la ĉirkaŭaĵon. Ĉifoje ni iros buse al la iama karbominejo de Bexbach. Ni iros malsupren kaj vidos sur kvin, parte subgrundaj, etaĝoj la historion de la karba industrio.

La kulmino de la Kultura Semajnfino estos denove bela, bongusta bankedo en solena etoso sekvita de koncerto kun "inicialoj d.c." (tiu estas Eric Languillat) denove Ralph Glomp kaj verŝajne alia kantistino kies nomon ni ankoraŭ ne mencias.

La aliĝilon vi trovas en nia retejo: <https://esperanto-saarland.info/veranstaltungskalender/>

La teksto unue aperas en la germana, sed vi povas ŝanĝi la lingvon de "Deutsch" al "Esperanto" en la menuo.


## Vi havas tri eblojn aliĝi:

1) Plenigu la aliĝilon sur la ekrano de via komputilo (poŝtelefono NE eblas), konservu ĝin sub nova nomo (ekz. „alighilo\_vianomo.pdf“) kaj sendu ĝin al [kfsf@esperanto-saarland.info](mailto:kfsf@esperanto-saarland.info)

2) Elŝutu kaj printu la aliĝilon kaj plenigu ĝin per skribilo. Skanu la dokumenton kaj sendu ĝin al [kfsf@esperanto-saarland.info](mailto:kfsf@esperanto-saarland.info)

3) Elŝutu kaj printu la aliĝilon kaj plenigu ĝin per skribilo. Sendu ĝin per kutima poŝto al Martin Thorenz, Hohenzollernstr. 80, 66953 Pirmasens

Mi jam ĝojas pri via respondo! Elkore salutas vin  
**Martin Thorenz**  
(prezidanto de SEL)



# La Eŭropa Esperanto-Kongreso Strasburgo

## 8-12 Majo 2024

La eventon partoprenis 618 esperantistoj el 35 landoj ne nur el Eŭropo, sed ankaŭ el aliaj kontinentoj.

**A**l la kongreso, krom la ĉeforganizanto *Esperanto-France*, aliĝis la Germana E-Asocio (GEA), la Belga E-federacio (BEF), la Svisa E-Asocio (SES), la Itala E-Federacio (IEF), la Internacia Fervoĵista E-Federacio (IFEF) kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Ĉeestis kaj la programon pliriĉigis per siaj intervenoj ankaŭ kelkaj estraranoj de UEA. La loka asocio organizis E-budon ĉe la eŭropa parlamentejo.

La kongresejo troviĝis en la strasburga universitato tute proksime al la urbocentro. Ĉe la alveno, en la vasta halo bonvenigis nin per kanto la famkonata grupo *Kajto*. Tuj ekestis bona etoso kaj la ĉeestantoj kunkantis. Ne pretervidebla estis kontraŭ-milita ekspozicio instalita tie. Ankaŭ eblis ricevi E-afiŝon por eŭropaj elektoj.

La prezidanto de Esperanto-Francio kaj de la loka kongreskomitato Bruno Flochon inaŭguris kaj salutis la ĉeestantojn de la kongreso. Bonvenigajn vortojn aldonis ĉiuj partneraj asocioj kaj aliaj institucioj. Surekrane salutis la kongresanojn la urbestro s-ino Jeanne Barseghian kaj la estrarano de la Rejna Konsilio. La inaŭguro finiĝis per kantado de la Esperanto-himno. Tuj poste ni estis invititaj al aperitivo kun kouglof-kuko. Ridetoj kaj ĝojo regis dum renkonto kun konataj geamikoj kaj koniĝo kun novaj esperantistoj. En angulo estis vendataj kelkaj E-produktoj, biero kun Esperanto-etikedo sur la botelo, veganajoj, marmelado kaj aliaj bongustajoj. La ĉeestantoj povis ankaŭ admiri filatelan ekspozicion, aĉeti bildkartojn kaj poŝtmarkojn aŭ specialan koverton dank' al Michel Basso. En gazetoj aperis pluraj artikoloj pri la evento.

La temo de la kongreso estis "Dialogo inter eŭropaj popoloj, portanto de paco", kiu estis bone pritraktata dum pluraj okazoj. La programo de la Eŭropa Esperanto-kongreso estis tre varia kaj riĉa. Estis prezentitaj multaj allogaj programeroj kaj prelegoj. Iom simile kiel dum la Universalaj Kongresoj estis malfacile elekti, ĉar pluraj okazis samtempe. Bone funkciis libroservo, E-kursoj, Scienca Universitata Sesio (SUS). Spontanee okazis kantateliero kun *Kajto*, omaĝo al Wilhem Auld kaj Marjorie Boulton, prelegoj kaj preparoj al KER-ekzamenoj, vesperaj koncertoj kaj multnombraj ekskursoj. La famkonata grupo *Kajto* Ankie kaj Nanne tutan daŭron de la evento animis la programon per siaj kantoj kaj kantigis la ĉeestantojn en pluraj okazoj.

Vespere okazis pluraj koncertoj de konataj kaj malpli konataj esperantistoj, inter kiuj muzikistino el Italio Klarisa. Ŝi ludis harpon kaj kantis en pluraj lingvoj amkantojn, Tim gitaris kaj kantis popularajn kantojn, Inicialoj D.C. uzis en sia programo sinkronizitajn videofilmojn. Jonny M prezentis regeostilan muzikon, Ralph Glomp adaptis kaj komponis muzikon kantante poemojn de Marie Hankel, Gijom' Armid ludis pianon kaj kantis siajn novajn iom utopiecajn verkojn. La muzikan kulturan programon teknike kaj bone prizorgis Floréal Martorel.

Dum pluraj lokaj ekskursoj la esperantistoj povis profiti ŝipadon sur kanaloj de Strasburgo kun esperantlingvaj komentarioj kaj admiri belajn pejzaĝojn. Eblis ankaŭ koni la urbon per turismaj trajnetoj, viziti la katedralon, parlamentejon, muzeojn ktp. Por fervoĵistoj estis alloga vizito de muzeo en Mulhouse. Dum la fermo de la kongreso estis projekciataj segmentoj el kongresa etoso por freŝe rememori agrablajn momentojn. Dum la muzikaj paŭzoj denove prezentigis: Tim, Gijom' kaj *Kajto*. Estis memorigita la unua franc-germana kongreso, kiu okazis en Strasburgo en la jaro 1969. Dank' al la bona organizado de la evento ĉiuj ĝuis neforgeseblan kongreson. **Liba Gabalda**

## REVELO-Tag

**Einladung zum REVELO-Tag und zur Landesversammlung des Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Verbandes.**

**A**lle Mitglieder des Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Verbandes sind herzlich zur diesjährigen Mitgliederversammlung eingeladen. Sie findet während des REVELO-Tages am Samstag, 26.10.2024 ab 11:00 Uhr statt.

Hierzu treffen wir uns im Café Komma des CVJM Hamm, Ostenwall 79, 59065 Hamm.

Informationen zum Programm des REVELO-Tages sowie eine genaue Wegbeschreibung schicke ich gerne per E-Mail oder Briefpost.

Ich bitte um Anmeldung bis zum 07.10.2024.

### Vorgesehene Tagesordnung:

TOP 1: Wahl des Sitzungsleiters. Begrüßung und Eröffnung. Wahl des Protokollanten. Feststellen der ordnungsgemäßen Einladung und Beschlussfähigkeit. TOP 2: Feststellen der Tagesordnung. TOP 3: Bericht des Vorstands. Bericht des Schatzmeisters. TOP 4: Bericht der Rechnungsprüfer. Entlastung des Vorstandes. TOP 5: Sonstige Aktivitäten und Anträge, soweit bis zur Sitzung eingereicht. TOP 6: Verschiedenes. In Ergänzung zur Tagesordnung können schriftliche Anträge sowie Bekanntmachungen an die Vorsitzende gerichtet werden.

**Petra Dückershoff**, Auf der Panne 74 a 44805 Bochum  
*petra.dueckershoff@esperanto.de*




**Akademio Internacia de la Sciencoj**  
**40-a Scienca Universitata Sesio (SUS)**

9:00 Terapio pere de lumo – Joel Fontaine  
 9:45 Astrofiziko por laikoj – Amri Wandel  
 10:45 Transponti kulturojn: kionecesas? – Duncan Charters  
 11:30 Statistika komparo de diverslingvaj tradukoj de "La eta princo" – Ulli Ender

**Dimanĉo**

9:00 Novaj steloj, foraj galaksioj, supernovaoj – Carlo Spinola  
 9:30 Cifereca poluado – Aleks Kadar  
 10:00 Sen migrado nenlu evoluo – Judith Jackson



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda